


pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Jaro 97 • N-ro 1/2003 • ISSN 0032-2431

Ĉio komenciĝis en Krakovo...



1

2003

Enhavtabelo:

ENKONDUKE

- 3 Ĉio komenciĝis en Krakovo...
 - 5 Nia nova vivo
 - 6 Ĉu vere „Pola Esperantisto”?
 - 7 Unueco estas forteco kaj malunueco estas malforteco!
-

HISTORIE

- 8 Pola Esperantisto
 - 9 Portretoj – Stanisław Karolczyk
 - 11 Pola Esperantisto 55 jarojn aĝa
 - 14 Mi dankas la vivon
-

ALIFLANKE

- 15 Perfekta esperantista civitano?
-

NUNTEMPE

- 18 Parolas Varsovio en Esperanto
-

RELIGIE

- 24 Animzorgado kiel la katolika E-movado en Pollando (1)
-

- 28 AKTUALE – EN NIAJ RONDOJ
-

La kovrilpaĝo: la reĝa kastelo sur Wawel, Krakovo. Desegnita de Andrzej Kotpanowicz.

pola esperantisto

socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare

Eldonas: Wydawnictwo HEJME, <http://www.hejme.e-tools.pl>

Redakcia stabo: Zofia BANET-FORNALOWA, Zbigniew GALOR,

Ilona KOUTNY, Kazimierz LEJA (ĉefredaktoro) Lidia LIGĘZA,

Danuta ŻELIŃSKA kaj multaj kunlaborantoj.

Jarabono pola: 30,00 PLZ pagenda al:

Wydawnictwo HEJME, 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21

Millennium BIG Bank SA:

15 1160 2202 0000 0000 1946 1159

jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s>

Jaro 97 • N-ro 1 / 2003 • ISSN 0032-2431

eldonkvanto 200 ekz.

Ĉio komenciĝis en Krakovo...

Tiu mistera esprimo havas sian profundan sencon... Rilate *Polan Esperantiston*, la reĝa urbo Krakovo dufoje en la historio savis la revuon. Unue, en la jaro 1926, kaj poste en 1946 j. Nun denove *Pola Esperantisto* vekiĝis en Krakovo! En la esperanta historio estas pluraj ekzemploj de pozitiva influo de krakova esperantistaro al disvastigo de Esperanto kaj kreskigo de nia komunumo (ankaŭ mi ĉi tie esperantiĝis antaŭ 25 jaroj, kaj post dekkelkjara paŭzo en mia aktiveco en pola esperantujo, antaŭ kelkaj jaroj ili denove akceptis min kiel membron en siajn vicajn; nun ili apartenas al la aro de miaj firmaj kunlaborantoj).

Kiel en la tuta lando, hodiaŭa krakova esperantistaro estas bedaŭrinde dividita kaj ne tro multnombra, ne havas sian propran sidejon, arkivejon, bibliotekon, nek... monon. Laŭ la kalkulo de iu konata krakova esperantisto, en Krakovo funkcias aktuale 7 Esperanto-organizaĵoj! Ĉu tio estas sukceso, aŭ fiasko?

Malgraŭ ĉio ili „batalas” laŭ siaj eblecoj. Tial mi klinas mian kapon

antaŭ krakovaj geamikoj, kiuj ne lasis min sola en la decido reeldoni *Polan Esperantiston*, kaj mi esperas, ke ni ĉiuj (ne nur krakovanoj) baldaŭ eltrovos en niaj koroj iun internan ideon *komune agi*, kiu esprimiĝos per niaj saĝaj paŝoj.

La unua paŝo miaflanke estas la revuo, kiun vi tenas en viaj manoj. Tre modesta, sed abunda samtempe. La revuo, kiu povas esti *ligilo* inter disĵetitaj samlingvanoj. *Pola Esperantisto* povos aperadi kaj fariĝi pli kaj pli bonkvalita nur tiam, kiam ĝi trovos konstantan, sufiĉe vastan legantaron, kaj pli multajn kunlaborantojn. Memoru ankaŭ, ke ĝi povis ekesti kiel sendependa revuo dank’ al saĝa decido de PEA.

La historio de nia movado pruvigas, ke eĉ Esperanto kun sia genieco ne sufiĉas, por solvi lingvajn problemojn de la mondo. Bezonataj estas homoj, kiuj uzas ĝin, ne nur private, por propra ĝuo, hobie, sed por pli altaj celoj kaj idealoj. Ilin unue oni devas havi kiel pola civitano, poste kiel esperantisto. Tial ne sufiĉas fariĝi esperantisto; nia lando devas klare vidi fortan esperantistan *komunum-*

on, bone organizitan, kiu scipovas disvolviĝadi dank' al modernaj metodoj kaj teknikoj, kiu havas ion valoran por oferti al la mondo; kiu havas sian konstantan lokon en landaj politiko, ekonomio, kulturo, sociaj problemoj, religio kaj multaj aliaj. Ankaŭ la „esperanta mondo” atendas plifortigon de nia agado, en la lando, kie ja naskiĝis Esperanto.

Ĉu ni, polaj geesperantistoj, sentas sin respondecaj antaŭ la historio, kies parto ni estas? Ĉu, anstataŭ bedaŭri pro manko de ŝtata subteno, sen kiu — onidire — nenion ni povas atingi, ni faras niaflanke ĉion eblan por fariĝi rekonata *socia movado*? Ĉu ni celas kaj volas trovi la rimedojn por kuraĝe iri antaŭen? Kaj ĉu plu unuope, dividitaj...? *Ni povas tion ŝanĝi!*

Neniam mi opiniis, ke unu tutlanda organizaĵo kun multaj filioj, burokrata aparato, ktp. estas plej bona rimedo por iu ajn movado. Aliflanke, sen la moderna gvidantaro, sen bone pripensita strategio, klaraj motivoj de la agado, neniu komunumo, ankaŭ ni, atingos la celon. La usona ekzemplo de unu tutlanda esperantista organizaĵo pli laŭte parolas al mi ol ĉiuj partikularaj interesoj kaj kve-reloj de trompiĝintaj homoj.

La legantoj de *Wydarzenia* povis antaŭ kelkaj monatoj ekscii pri tre favora decido de ministro Włodzimierz Cimoszewicz rilate Esperanton en la Pola Radio. Ĉi-foje ni povas tralegi ege interesan interpa-

rolon kun prof. Bronisław Geremek, antaŭnelonge intervjuita de redaktoro Barbara Pietrzak. La intervjuito, iama esperantisto(!) donas *la radion de optimismo* ankaŭ al nia estonto. Sed ĉu troviĝos homoj prudentaj inter niaj gvidantoj, kiuj utiligos ĝustatempe vere favoran atmosferon por puŝi antaŭen la aferojn?

Vekiĝu la dormantoj! Ni pensu idealisme, sed partoprenu aktive kaj agu efektive, kiel ekzemplon prenante tiujn, kiuj atingas siajn celojn!

Kaj nun kelkaj vortoj, rilate ĉi tiun numeron de nia revuo. Ĝi havas kaj specialan karakteron kaj la enhavon; abundas en ĝi historio, ĉar la okazo estas historia. Tamen ne ĉiam tiel estos; tiuj 30 paĝoj estos dividitaj pli juste: kaj por la historio, kaj por la aferoj lingvaj, porinfanaj, por la novaĵoj, kaj por multaj aliaj. Inter ili troviĝos konstantaj rubrikoj, kiujn gvidos konkretaj personoj (iliajn nomojn vi trovos ĝustaloke).

Ĉiam memoru, ke komuna gazeto estas samtempe la libera forumo de pensoj kaj opinioj, kiujn — laŭ mia konviko — oni ne povas cenzuri.

Ĉiam bonvenaj estos viaj rimarkoj, proponoj, kritiko, sed antaŭ ĉio via kontribuo. Preferataj estas la tekstoj en formo elektronika. Se vi ne uzas komputilon, povas esti eĉ manskribitaj. Pensu ĉiam pri *Pola Esperantisto* kiel pri sia propra revuo, ĉar vere tia ĝi estas.

Bonan legadon!

Kazimierz LEJA

Nia nova vivo

Kiam antaŭ dekkelkaj jaroj Pola Esperanto-Asocio decidis ĉesi eldonadon de *Pola Esperantisto*, miaj esperantaj geamikoj ŝercis: *Paweł, nia Majstro komencis la revuon antaŭ cent jaroj kaj vi ĉion detruis!*

Ne estis por mi, kiel la lasta ĉefredaktoro de nia revuo, facile akcepti tiun decidon. Tamen per grandaj paŝoj proksimiĝadis novaj tempoj, kies unua videbla trajto estis financaj malfacilaĵoj. La protekto de la ŝtato finiĝis kaj evidentiĝis, ke onidiraj dekoj da miloj de polaj esperantistoj ne povas financi la revuon laŭ komerciaj principoj. *Pola Esperantisto* neniam havis pli ol kelkajn milojn da legantoj kaj la „komercia” prezo estus por ili neakceptebla.

Nova politika reĝimo de nia lando, tiom atendata per milionoj da poloj, estis ankaŭ provo de (mal)solideco de la pola movado. Dum kelkaj sekvantaj jaroj ĝi preskaŭ malaperis, kune kun multaj esperantaj organizaĵoj. Rapide ekestantaj privataj eldonejoj ne interesiĝis pri Esperanto, la ŝtataj ne volis riski monon por necertaj aferoj. Multaj esperantistoj, kiuj traktis la lingvon kiel fene-

stron al la mondo, ekinteresiĝis pri aliaj aferoj.

Feliĉe restis homoj, kiuj ne forgesis pri sia amata lingvo kaj ĉiam pensis pri revivigo de la movado kaj eldonaĵoj. En la 90-aj jaroj aperis tute novaj eblecoj, antaŭ ĉio komputiloj kaj la interreto. Malgraŭ konataj kaj eternaj problemoj kun la esperantaj literoj oni aktive partoprenis en multaj internaciaj forumoj kaj la nombro de la interretaj paĝoj atingis jam dekojn da miloj. Danke al programistoj-esperantistoj ni povas jam plene uzi la esperantan *abocion*.

Komputada tekniko estas granda ŝanco ne nur por esperantistoj profitantaj de la nova mondo sed ankaŭ por personoj, kiuj ŝatas legi tradiciajn eldonaĵojn. Komputilo, printilo kaj kopiilo estas instrumentoj kiuj permesas eldoni librojn kaj revuojn hejme. La nombron de ekzempleroj oni povas pligrandigadi aŭ malpligrandigadi laŭ la bezono. El tio profitas ankaŭ la nova *Pola Esperantisto*, kiu estas la unua paŝo al, ni esperu, pli bona estonteco. Ĉiu, kiu memoras pri la primitivega eldona tekniko de la „malnova” revuo, tuj akcep-

Ĉu vere „Pola Esperantisto”?

Karaj Gelegantoj. En Viaj manoj estas la unua numero de „Pola Esperantisto”, post dekkelkara paŭzo. Ni certas, ke tiu ĉi numero estos por Vi kaj ni enkonduknumero, kiu instigos Vin reagi, kian direkton de eldonado akcepti. Situacio de pola esperantismo atingis tian momenton, ke ni devas pensi ne nur pri siaj asocioj, kluboj kaj rondoj.



⇒ tos la modernajn teknikajn eblecojn de la komputila mondo. Kaj la nuna ĉefredaktoro ne devos jam iradi ĉiumonate al la cenzuristo, kion mi mem devis fari en la 80-aj jaroj.

Ludoviko Zamenhof, kies verko estis sukcese akceptita en la tute nova mondo, certe ĝojus, ke Esperanto povas plue plenumi sian rolon. La interreto, en kiu la plej grava estas la angla lingvo, montras forte, ke la problemo de la lingvo internacia estas plene aktuala. Kaj kiu lingvo estas la plej facila kaj ellernebla ilo? Esperanto, kiel ĉiam. Ni ĝoju nun pri la bona komenco kaj esperu, ke post multaj jaroj de silento la pola movado reviviĝas.

Antaŭ kelkaj monatoj, en septembro 2002, oni subskribis kontrakton inter Pola Esperanto-Asocio kaj Silezia Esperanto-Societo pri plifortigo de kunlaborado. Tio estas la unua paŝo, kiam plej grandaj polaj E-asocioj pensas kaj volas kunlabori.

Nun ni atendas la reagojn de aliaj. Venis jam intencleroj el Krakovo kaj Toruń. Tio estas signoj, ke en diversaj lokoj de Pollando oni pensas simile. Eble post kelka tempo oni fondos unu pli fortan polan E-organizaĵon. Sed ĉu tio realiĝos, dependas ankaŭ de Vi. Eble paĝoj de „Pola Esperantisto” fariĝos la forumo por diskuti pri diversaj problemoj de pola E-movado, kaj ne nur pri polaj E-problemoj...

Ni certas, ke „Pola Esperantisto” estos la loko, kie ĉiuj, sendepende de aparteno, priskribos siajn rimarkojn, siajn travivaĵojn kaj siajn ĉiujn...

Ni proponus, ni ĝojus, ni kontentus, kiam ĉiuj legantoj fariĝus kunredaktoroj de sia revuo, revuo ne de iu organizaĵo, sed de la tuta pola esperantistaro. Konvinku ĉiujn, ke la demando en la titolo de tiu artikoleto estas neĝusta.

Dezirante tion al Vi kaj al ni, tutkore salutas Vin komence de la Nova 2003 Jaro.

Unueco estas forteco kaj malunueco estas malforteco!

Karaj polaj esperantistoj, ne temas pri ekzerco pri la prefikso *mal-*. Temas pri konstato, kiun ĉiu el vi povas fari multe pli bone ol mi. Ĉiu el vi konas la polan historion nekompareble pli bone ol mi. Do, provu pensi pri tio, kio okazis en la periodoj kiam poloj estis unuecaj kaj kio okazis, kiam poloj estis malunuecaj.

Ĉi tiuj vortoj estis reprenitaj de pluraj esperantistoj dum la vivo de Esperantujo, kaj laste mi vidis ilin enĉizitaj antaŭ la nova sidejo de Brita Esperanto–Asocio. Do se tiom da homoj rediris ilin en ĉiu generacio, eble io vera estas en tiu diraĵo.

Mi komprenas, ke reage al la antaŭa situacio oni diris: *Sufiĉas pri unuecaj organizaĵoj! Ni ĉiuj estas liberaj nun, kaj sekve ĉiu faru kion li volas, kaj neniu estu devigata pagi membrokotizon al iu ajn.* Mi komprenas, ke tia estas normala homa reago. Sed tie finiĝas mia kompreno.

Nun, kiam oni jam spertis pri la malbonaj sekvoj por ĉiuj de la ekzistanta individuisma situacio, eble estas la momento por resaĝiĝi kaj reveni al la unuecaj organizaĵoj. Se tio odoras tro multe je komunismo, simple pensu pri la Esperanto–movado en Usono. Tie ekzistas unu landa organizaĵo ELNA, kiu organizas

ĉiujn esperantistojn kaj ekzistas la lokaj kluboj, kiuj organizas la lokajn esperantistojn.

Kial tio ne povas okazi ankaŭ en Pollando? Kial oni ne povas havi regulajn kongresojn por elekti la prezidanton kaj la estraron kaj malelekti ilin la sekvantan fojon, se ili ne kondutis bone?

Kial PEA ne povas esti la asocio de ĉiuj? Kial ĉi tiu revuo ne estu la revuo de ĉiuj? Kial la ret–listo

<polaj-esperantistoj@yahoo.com> ne estu la listo de ĉiuj?

Ĉu vi kredas, ke eksterlandaj esperantistoj povas distingi inter la aktivega loka klubo de la urbo Ikso kaj la malaktivega klubo de la urbo Ispilono?

Mi petas vin, pro tio, ke vi reprezentas la naskiĝlandon de Esperanto, formetu viajn malgrandajn interhomajn problemojn, kaj vivigu la fortan PEA–n kun fortaj lokaj kluboj. Esperantistoj estis daŭre fieraj pri polaj esperantistoj. Ĉu ni volas senluziigi ilin?

PEA (kaj ĝiaj kluboj) partoprenu en la du ĉefaj agadoj de la Esperanto–movado:

— la kampanjo *Por pli vasta komunumo*, varba kampanjo ne nur por UEA sed samtempe por la landaj

la rubrikon gvidas Zofia BANET-FORNALOWA

Pola Esperantisto

„Pola Esperantisto” ne apartenas al la plej fruaj Esperanto-revuo-
oj. La historia situacio: manko de
sendependeco de Pollando, ne favo-
ris al Esperanto. Tiukaŭze la Mova-
do — societo, ĝia revuo — ekestis, en
la naskiĝlando de Lingvo Internacia,



⇒ asocioj kaj la lokaj kluboj;
— la kampanjo *Lingvaj Homaj
Rajtoj*, vasta informkampanjo pri
Esperanto kiel ilo de interpopola ju-
steco.

Ĉar ni parolas pri interpopola ju-
steco, mi kredas, ke poloj kaj ĉefe po-
laj esperantistoj estos baldaŭ deviga-
taj batali por la pluvivo de la propra
lingvo kaj kulturo. Temos pri tre
malfacila batalo, ĉar antaŭ la meto-
doj de la Eŭropa Komisiono en Bru-
selo por angligi Eŭropon la Cen-
tra Komitato de la tiama Komunista
Partio de Rusujo aspektas kiel speco
de bonkora meti-lernanto.

En ĉi tiu lukto ĉiuj esperantistoj
estos kun vi. Multajn bondezirojn al
la pola Esperanto-movado!

Renato CORSETTI

malpli frue ol en kelkaj aliaj landoj.
Lanĉita en 1906 kiel societa organo,
„Pola Esperantisto” karakteriziĝis
kiel pli-malpli valora, laŭ idea kaj li-
teratura nivelo, en apartaj periodoj,
revuo. Tamen, ĝi ĉiam servis al la
Movado unuige kaj klerige.

Pro militoj, malfavora ekonomi-
socia kaj politika situacioj, ĝia ape-
rado estis kelkfoje prokrastata, sed
neniam ĝia malĉeesto daŭris tiom
longe, kiam lastatempe. Dum pli
ol 12 jaroj, ekde 1990–2002, pol-
landa Esperanto-movado devis
„kontentiĝi” per kelkaj tre modestaj,
efemeraj bultenoj.


Ne savis la situacion ofereme el-
donita de kol. Antoni Beyga, la-
ste de Kazimierz Leja, bulteno „Wy-
darzenia” (Eventoj). La ŝrumpigita,
malforta pollanda Esperanto-mo-
vado nepre bezonas tutlandan, si-
steme aperantan, altnivelan revuon,
kiu servos unuige, stimulos al akti-
vado, influos altigon de ĝia idea kaj
kleriga stato.

Entreprenita de kol. Kazimierz
Leja tasko reaperigi „Polan Espe-
rantiston”, en tre malfavoraj cirkon-
stancoj, vekas admiron, esperigas... ⇒

Stanisław KAROLCZYK

Ĉi-loke valoras kelkvorte memori la vere meritan, pioniran esperantiston, unu el la plej fruaj Esperanto-poetoj. Ĝi estu unua el la ciklo **Portretoj**, en kiu la redakcio intencas en konciza formo prezenti siluetojn de eminentaj pollandaj esperantistoj.

Stanisław Karolczyk (1890–1966) naskiĝis la 14an de aprilo en Mirosławice apud Lo-



dzo, sed dum pluraj jaroj loĝis en Varsovio. Li estis esperantisto ekde 1907 kaj plenumis gravajn asociajn funkciojn. Dum kelka tempo li estis prezidanto de Pola Esperantista Societo, vicprezidanto de la Postkongreso en Varsovio, en 1931, membro de Lingva Komita-

to (posta Akademio) kaj, kiel dirite, reviviganto kaj redaktoro de „Pola Esperantisto” en tre malfacila periodo (1922–1926).

Valoras mencii, ke li jam kiel junulo okupiĝis pri redaktado, nome en la jaro 1909 li komencis redakti kaj eldonadi en Lodzo junularan revuon „Juna Penso”. Li verkis sub pseŭdonimo Eska. Liaj unuaj poemoj aperadis en la jaroj 1909–1914 en diversaj Esperanto-revuoj.

La kolekto de liaj poemoj kun poemoj de Stanisław Braun (pseŭdonimo Wiktor Elski), sub titolo „Unuaj agordoj” aperis en 1910. Kelkaj poemoj de Karolczyk



⇒ De nia komuna apogo: verkado, abonado, dependas ĝia sukceso. Nepras granda mobilizo kaj fortostreĉo.

Oni esperu pri plena kompreno flanke de Samideanaro rilate tiun esence gravan entreprenon. De tio dependas, ĉu „Pola Esperantisto” daŭros kaj povos, kiel en pasinto, servi por pli bona estonto al la Movado.

Zofia BANET-FORNALOWA
decembre 2002

en traduko al la pola de Leo Belmont (vera nomo Leopold Blumental) aperis en antologio de Ludwik Stolarzewicz: „Literatura Łodzi w czasie jej istnienia” (Literaturo de Lodzo en periodo de ĝia ekzisto) en la jaro 1935. Nepras mencii, ke li inspiris A. Grabowski traduki la tutan „Sinjoro Tadeo” de Mickiewicz.*

Dum la 30aj jaroj Karolczyk pretigadis Polan Antologion, tradukante por ĝi verkojn de polaj poetoj al Esperanto. Bedaŭrinde, pretajn por preso du volumojn ensorbis flamoj de Varsovia Insurekcio en 1944.

Post la II mondmilito la poeto ne plu verkis originalajn poemojn, okupiĝante ĉefe per tradukado de poemoj de: Jan Kasproicz, Maria Konopnicka, Władysław Broniewski, Jan Koprowski kaj Julian Tuwim al Esperanto.

Li ankaŭ pretigis por eldono elektitajn poemojn de sia amiko Stanisław Braun, bedaŭrinde, ĝis

nun ne eldonitaj. La tajpaĵo troviĝas en Biblioteko de Lodza Univerŝitato.

Stanisław Karolczyk, merita veterano de pollanda Esperanto-movado, rekonata poeto kaj publicisto, mortis en Lodzo la 19an de julio 1966.

Sur lia tombo-ŝtono troviĝas dulingva surskribo: „Poeto kaj veterano de Esperanto-movado — Poeta i weteran ruchu esperanciego”.

Oni ŝatus fini ĉi-modestan rememoron per latina sentenco (el kantoj de Horaco): *...non omnis moriar...* ne tuta mi mortis, mi vivos per miaj verkoj.

Ĉi-numere unu el pluraj liaj koresprimoj.

Zofia BANET-FORNALOWA

* Oni povas pri tio legi en libro de Zofia Banet-Fornalowa *Antoni Grabowski — eminenta Esperanto-agento* p. 73 kaj p. 107–108 en la dua eldono — red.

La redakcio decidis, almenaŭ koncize, prezenti la pasinton de „Pola Esperantisto”. Tiucele ni publikigas artikolon, aperigitan en la 5a numero el 1961 de „Pola Esperantisto”. Ĝia titolo estas: „Pola Esperantisto 55 jarojn aĝa”, kaj ĝia aŭtoro estis Stanisław Karolczyk, persono kompetenta kaj merita rilate la revuon, ĉar persone ĝia redaktoro en la jaroj 1922–1926, kaj dum multaj jaroj riĉiganta ĝin per siaj artikoloj kaj poemoj. La artikolo estis reviziita kaj kompletigita per aldono de kelkaj antaŭnomoj de Zofia Banet-Fornalowa.

„POLA ESPERANTISTO”

55 jarojn aĝa

(La teksto aperis en *Pola Esperantisto* N-ro 5, sept.–okt. 1961)

En monato julio pasis 55 jaroj ek de apero de la unua numero de „Pola Esperantisto”.

Estas do okazo por rememorigi speciale al juna generacio esperantista la faktojn de nia tiutempa movado.

Preparante pli vastan laboron je tiu temo, mi intencas mallonge skribi pri tiuj pasintaj jaroj, dum kiuj mi persone unuafoje konatiĝis kun vorto Esperanto.

La 11an de decembro 1906 jaro Dro Wilhelm Róbin* dum kunveno de Varsovia Societo Esperantista prelegis pri sia vojaĝo al Malproksima Oriento kaj sian prelegon komencis jene:

„Kiam mi forveturis en Malproksiman Orienton en februaro 1904 jaro, t.e. antaŭ preskaŭ 3 jaroj, la stato de nia afero en Varsovio estis malbona. La tieaj samideanoj estis disaj, nenion pri si reciproke sciis, ne konis unu la alian, ne estis organizitaj. Ni ĉiuj laboradis por Esperanto en la silento de niaj kabinetoj kaj revadis

pri la tempo, kiam estos eble grupiĝi, kuniĝi kaj komune pripensadi la rimedojn de disvastigado de nia lingvo”**...

Oni devas scii, ke tiuj tempoj en Varsovio ne estis favoraj por propagando de nia ideo. Daŭris rusa-japana milito kaj en 1905 jaro komenciĝis revolucio, kiu rapide disvolviĝis tra tuta teritorio de rusa parto de Polujo, t.n. Reĝolando.

Ŝanceliĝanta en siaj fundamentoj la cara regado des pli persekutis ĉion, kio havis iajn eĉ plej etajn signojn de progreso kaj libereco. Tiu tempoperiodo ne estis do oportuna por propagandi Esperanton.

En multe pli favoraj cirkonstancoj estis dua parto de Polujo, tiel nomata Galicio, troviĝanta sub regado de aŭstro–hungara imperio. En komenco de 1906 jaro dank’ al kelkaj aktivaj esperantistoj, inter aliaj inĝ. Edmund Libański, Władysław Skalski, Stanisław Łazica kaj Antoni Stanisław Reiner fondiĝis en Lvovo unua en Galicio societo „Esperanto”. En

* Dr. Wilhelm Róbin, Vicpr. de T.E.K.A. unu el la pioniroj murdita de germanoj dum la lasta mondmilito.

** „Pola Esperantisto” nro 4 Lwów, februaro 1907.

julio de la sama jaro aperis en Lvovo unua numero de „Pola Esperantisto” kun subtitolo — „esperantaj sciigoj por pollingvanoj”. Enhavo de tiu numero estis sufiĉe riĉa. Sur unua paĝo troviĝis alvoko de redakcio en pola lingvo al ĉiuj volontuloj por komuna laboro. Postsekvas la artikolo de inĝ. E. Libański sub titolo „Ni laboru kaj esperu” enhance propaganda, kiun sukcese oni povus represi hodiaŭ, ĉar ĝi perdis nenion de sia aktualeco.

Rubriko titolita „esperanta movado” estas tiel abunda, ke hodiaŭ, nenia esperanta gazeto informas tiel detale kaj riĉe. Samideano nro 3747, Stanisław Schels, en longa artikolo „Esperanto kaj Volapük” pruvas superecon de la unua kaj antaŭvidas la finon de la dua. Literaturan parton de la unua numero reprezentas nomoj de Leono Zamenhof, Leo Belmont kaj Stanisław Łazica. Komuniko pri dua kongreso universala en Ĝenevo fermas la enhavon de la unua numero de „Pola Esperantisto”. En sekvantaj numeroj oni trovas krom jam cititaj nomoj pluajn kunlaborantojn: Dro Fels, Dro Kazimierz Bein (Kabe), Helena Hempel, Dro Bronisław Skalkowski, Dro Samuel Krukowski, Anna Bodek, Leon Rosenstock. Entute en Lvovo dum periodo de julio 1906 ĝis septembro 1907 aperis dumonate 8 numeroj.

Malgraŭ ke en tiu tempo fondiĝis en Galicio multaj societoj krom la Lvova, en Kraków, Nowy Sącz, Tarnopol, Przemyśl, Sanok k.a. kaj

malgraŭ ke Varsovia societo abonis la gazeton por ĉiu sia membro, financa stato de eldonisto malebligis pluan aperadon de „Pola Esperantisto” kaj tiamaniere finiĝis la unua periodo de la gazeto. En januaro 1908 en Varsovio reaperas „Pola Esperantisto”, kies unua numero redaktata de Dro Leono Zamenhof prezentiĝas tre bone. La kondiĉoj por eldonado de la gazeto en Varsovio tiutempe multe pliboniĝis. En tiu jaro funkcias jam Pola Esp. Societo anstataŭ antaŭa, kiu estis nur filio de Peterburga societo „Espero”.

Kondiĉoj estis des pli favoraj, ke troviĝis samideano, kiu per siaj propraj monrimedoj garantiis regulan, ĉiumonatan aperadon de la gazeto. Persono tiu estis neforgesebla kolonelo Jan Günther, populara inter esperantistoj kiel „Sinjoro”. Jan Günther, perfekta administranto kaj direktoro de la gazeto, tiutempe eldonis multe da propaganda materialo, inter aliaj multajn librojn.

Efektive, tiutempe la gazeto aperadis tre regule ĉiumonate kiel deksespaĝa kun kovrilo numero. Speciale bela sur bona papero estis jarkolekto 1912 riĉe ilustrita, informanta pri okazonta en tiu jaro kongreso en Kraków. Kolonelo Jan Günther atendas ankoraŭ sian biografiiston, kiu pli detale elmontrus lian netakseblan meriton sur kampo de la propagando de nia ideo.

Eksplodo de la unua mondmilito kompreneble malebligis pluan vivon

de la gazeto kaj ĝia eldonanto forveturis Rusujon. Tiamaniere finiĝis la dua periodo de „Pola Esperantisto”.

Jaroj 1919, 1920 post fino de la unua mondmilito ankoraŭ ne estis bonaj por vasta propagando de nia ideo. La renaskiĝinta lando, komencis organiziĝi kaj nemultaj esperantistoj, kiuj troviĝis tiutempe en Varsovio, rekomencis kontaktiĝi. En privataj loĝejoj de samideanoj Günther, Miernicki, Essigman k.a. komenciĝis ne multnombraj kunvenoj, dum kiuj oni priparoladis rekreon de Pola Esperantista Societo kun ĝia gazeto „Pola Esperantisto”.

S–ano Jan Günther ne povis plu helpi la entreprenon, ĉar la milito ruinigis lin finance, do oni decidis fondi Eldonan Societon por reaperigi „Polan Esperantiston” kaj organizon de tio prenis sur siajn brakojn la subskribinto. Mi devas aldoni, ke la penso de Eldona Societo teorie estis bona, tamen kiel poste montriĝis praktike mi devis el propra poŝo financi tutan entreprenon. Post multaj preparaj laboroj en oktobro 1922 j. mi sukcesis eldoni la unuan post la milito numeron de „Pola Esperantisto” kaj dum kvar jaroj ĝis oktobro 1926 mi ĝin eldonadis kaj redaktis. Ĉirkaŭ la gazeto grupiĝis ĉiuj tiam troviĝantaj ne nur en Polujo agemaj samideanoj, inter kiuj la plej helpemaj estis Jan Kostecki, Bronisław Kuhl, Włodzimierz Pfeiffer kaj aliaj. Estante tiutempe ĉiam pli multe okupita per miaj propraj fakaj laboroj, mi ne povis plu dediĉi la

tempon al redaktado de „Pola Esperantisto”, do mi petis Profesoron Odo Bujwid, kiu estis prezidanto de P.E.S., ke li bonvolu repreni en Kraków pluan eldonadon de la gazeto. Prof. Bujwid volonte konsentis kaj de tiu tempo 1926 j. „Pola Esperantisto” kontinuus sian vivon en Kraków, kence redaktata de Bronisław Kuhl, poste de prof. Bujwid mem.

En julia numero de tiu Krakova eldono en 1930 j. prof. Bujwid skribis: „En la nuna nro de „Pola Esperantisto” la legantoj trovos unuafoje la nomon de nia konstanta kunlaboranto s–ano Tadeusz Hodakowski, kiel kunredaktanto. Cetere li jam delonge faras grandparte la redakcian laboron”.

Tiamaniere la nuna ĉefredaktoro de „P.E.” gvidis ĝian redakcion ĝis al la eksplodo de la dua mondmilito en 1939 j. kaj tiel finiĝis do jam tria periodo de „Pola Esperantisto”.

Jan Günther mortis en Varsovio dum la lasta mondmilito.

La kvara periodo de „Pola Esperantisto” komenciĝis preskaŭ tuj post la dua mondmilito, ĉar jam en majo 1946 j.

Dum tuta Polujo komencis levigadon el la postmilitaj ruinoj, restintaj polaj samideanoj en Kraków fondis „Asocion de Esperantistoj en Pollando” kaj rekomencis eldonadon de „Pola Esperantisto”. Tiutempe aperis nur kelkaj numeroj presitaj kaj la gazeton anstataŭis la multobligata „Bulteno”.

⇒

MI DANKAS LA VIVON

Ne ekkonis mi feliĉon ĝis nune,
domon mian ĝojo ĉiam evitis,
jaroj junaj pasis preskaŭ aŭtune —
Kaj se ia min okazo ekscitis,
tio certe estis de l' kor' sufero,
aŭ doloro ĝeman krion recitis...

Ne konata al mi estis amkvero,
ĉiam iris mi tra vivo nur sola —
kaj se ia min minacis danĝero,
malgraŭ, ke mi ĉiam vivis izola,
min ne kaptis senespero turmenta,
ne karesis ies vorto konsola.

Tamen estas mi de l' vivo kontenta,
ĉar ĝi donis al mi forton magian,
ke mi povas en kvieto silenta
superregi kordoloron la mian
kaj rigardi ĝin nur kvazaŭ fiktivon...
Sorto donis al mi timon neniam
kaj pro tio kore dankas mi vivon...



⇒ „Pola Esperantisto” en hodiaŭa vesto aperas de la jaro 1957. Tia estas en la plej konciza resumo historio de „Pola Esperantisto” daŭranta jam 55 jarojn.

Komparante la nunan „Polan Esperantiston” kun numeroj el antaŭ la unua mondmilito kaj poste postmilitaj, oni devas konstati, ke ĝi laŭ sia teknika kaj redakcia flanko tute ne superas ilin. Tamen hodiaŭa stato de nia movado kaj cirkonstancoj

multe, nekompareble pli favoraj ol iamaj devigas plibonigon de la gazono. Ŝajnas, ke mi ne eraros, se mi en la nomo de ĉiuj polaj kaj ne nur polaj esperantistoj esprimos la deziron, ke „Pola Esperantisto” aperadu ĉiumonate kaj regule.

Tion atendas ne nur pola, sed tuta internacia Esperanto-movado kaj tion bonvolu konsideri Ĉefa Estraro de P.E.A.

Stanisław KAROLCZYK

la rubrikon gvidas Zbigniew GALOR

Perfekta esperantista CIVITANO?

Antaŭ niaj okuloj — kune kun la ekesto de Eŭropa Unio — reviviĝis malnova ideo pri *civitana socio*. Aliflanke, inter esperantistoj aperis koncepto de *Civito* (nepre grandlitere) kun sia unua realigo. Malgraŭ

diferencoj komuna por ili estas i.a. strebado al perfekta civitano.

Neesperantista ideo de *civitana socio* elkreskis el konvinko pri historia apero de civilizitaj socioj kaj nesufiĉa rolo de ŝtato en ili. Mezuro de konscia civitaneco estas memorganizado en diversaj asocioj «apude» de la ŝtato. Aŭ — en ekstrema versio — kontraŭ la ŝtato. Ambaŭ kazoj aperas en esperantista koncepto de *Civito*.

Civito — laŭ ideologiaj deklaroj de ĝiaj kreantoj — baziĝas sur graveco de civilizo (kulturo) por esperantistoj. Walter Ŝelazny deklaras, ke li estas civilizita esperantisto, kio en kunteksto de aparteneco al la *Civito* signifas dividon de la esperantistaro je du grupoj. La unuan grupon formas portantoj de la civilizo/kulturo — t.e. praktike, membroj de *Civito*, kaj la duan kreas neapartenantoj al ĝi, necivilizitaj esperantistoj, kiujn — baze de tiu aliro — ni povas nomi barbaraj esperantistoj. Do, ili malbone opinias, ke «ni» kiel skri-

Kial 'Aliflanke' estas la nomo de la felietona rubriko? — demandis min amiko, al kiu mi parolis pri la reapero de «Pola Esperantisto» kaj mia propra kontribuado por ĝi. Ĉu ne pli bona estus 'Bedaŭrinde'? — li reagis ironie — tiam la pesimisma vidpunkto de la verkanto estos ĉiam klare rekonebla. Ja 'Aliflanke' ne donas tian certecon. Ĝuste pro tiu ĉi necerteco kiu devas ĉiam deveni de la karaktero de ia unua flanko mi elektis 'alian flankon'. ZG

⇒

bas W. Ŝelazny — «bezonas tiajn asociojn, kiuj volas centriĝi piramide la tutan esperantistaron laŭ unu-sola modelo, eterne ĝusta, ununura» [Por ke la esperantistoj ne pereu antaŭ sia morto, LF, 2002, n-ro 200., p. 293]. Jen la dua eco de la neesperantista ideo pri civitana socio, kiun enhavas esperantista koncepto de la *Civito*: malantaŭ masko de «asocioj, kiuj volas centriĝi piramide la tutan esperantistaron» troviĝas UEA traktata same kiel ŝtato. *Civito* estas nenio alia ol provo enkonduki ideon de la civitana socio en esperantistan medion.

Neesperantista imago pri civitana socio iĝas pli kaj pli populara ne nur en eŭropaj landoj. Male okazas kun la ideo de *Civito* inter esperantistoj. Kial? Ja ĝi estas la *civitana socio* en apliko, ĉu ne? Krome ĝi proponas al esperantistoj — ŝajne tre allogan — sintenon de perfekta plenkonscia esperantisto-civitano?

Se preterlasi kontraŭdirojn de civita koncepto, kiujn priskribis Dettlev Blanke en *Esperanto* (2001, n-ro 1136, p. 82s.), se ne tro da rimarkoj dediĉi al la arkaika kostumo de civitaj institucioj (Forumo, Konsulo k.a.), tiam montreblas du ĉefaj kaŭzoj de *civita* komenca malvenko: premiso pri perfekta esperantista civitano kaj la apliko de la ideo de *civitana socio* mem.

Strebo iĝi civitano de iu ajn esperantistaro estas plej simple fremda al karaktero e-movado kaj al esperan-

tistoj. Nek la ideologio de esperanto, nek la lingvo estas redukteblaj al nacia aparteneco kaj ŝtata civitaneco. Socia esenco de esperanto *de ĝia komenco* estas superi naciŝtatajn barojn. Inter historiaj formoj de esperantaj organizoj ne hazarde ĝuste SAT ekhavis grandan popularecon. Esperanta *Civit-anigo* signifas revenon al sociaj strukturoj, de kiuj e-movado de sia komenco distanciĝas.

Sekve, la ideo de *civitana socio* mem ĉiam realiĝas enkadre de certa ŝtato/socio. Esperantistoj tamen neniam estis kaj estas ŝtato/socio. Inter alie pro manko de propra komuna ekonomio. Do ili ne kreas socian formon en kiun oni povus praktike enkonduki ideon de *civitana socio*.

Ambaŭ kaŭzoj montras, ke eĉ la plej bonintencaj deklaroj celantaj «feliĉigi» esperantistojn (Walter Ŝelazny substrekas, ke *Civito* estas «respondo je la krizo de Esperantio») restas neefikaj. Iluziaj solvoj devenas de manko de moderna sociscienca scio pri sociaj movadoj kaj abstraktigado de historio de la esperantista movado.

Restas tiam nur ideologiaj kaj emociaj pensado kaj argumentado. La sama pensadmaniero, kiun reprezentas la Grandmonarko de Bergengocio en la rakonto *Perfekta civitano* de S. Szathmári. La Majstro zem Fabius ne scipovis realigi taskon ricevitan de monarko (konstrui maŝinhomon en kiu koncentriĝas ĉiuj virtoj de subulo) kaj

tiel klarigas tion al li: «Mi dum unu jaro senĉese konstruis maŝinon post maŝino, mi serĉis, studadis mekanismon de la ideala civitano, sed fine mi devis konvinkiĝi, ke ĝi estas absurda kaj mi neniel kapablas plenumi ĉi taskon. Vi postulis neeblaĵon de mi, sinjoro. Neniam, nenispeca maŝino povos tiom multe plenumi! Tiom multe povas plenumi nur la animhava, konscioplena, vivanta homo!»

Kial ne kredi, ke esperantistoj estas pli perfektaj civitanoj? Ili ja mofede obeas al la Fundamento de sia lingvo! Aliflanke, la revo de *Civito* pri perfekta civitano esprimas sopiron pri perfekta esperantisto, pri subulo obeema, kontrolebla pere de reto de civitaj normoj kaj principoj, sed povas temi nur pri maŝino kiel tiu de Majstro zem Fabius. Ĉu indas?

Zbigniew GALOR



La Esperanta Civito estas subjekto de internacia juro. Ĝi plenumas la trian, kaj plej gravan, celon de la Pakto por la Esperanta Civito, lanĉita la 10an de aŭgusto 1998 el la urba biblioteko de Ĉaŭdefono (La Chaux-de-Fonds), Svislando.

Ĝia Konstitucia Ĉarto estis promulgita la 2an de junio 2001 en Sabloneto (Sabbioneta), Italio. Alia fundamenta teksto estas la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, proklamita la 2an de junio 1996 en Barcelono (Katalunio/Hispanio), danke al kiu la esperantistaro estas angoskebla kiel lingva grupo.

La Esperanta Civito havas federisman strukturon. La establoj aliĝintaj al la Pakto estas reprezentitaj paritete (egalrajte) en la Forumo. La membroj aŭ abonantoj de tiuj establoj rajtas peti la civitanecon kaj tiel elekti la Senaton, kie la diversaj listoj de individuaj civitanoj estas proporcie reprezentitaj. Forumo kaj Senato formas kune la Parlamenton.

La Konsulo estas la ĉefkandidato de la gajninta listo: li reprezentas oficiale la Civiton, prezidas la Parlamenton kaj gvidas la ekzekutivan organon, nomatan Kapitulo. La Konsulo (aŭ la Vickonsulo pri informado) responsas pri la retagentejo Heroldo Komunikas.

[El la hejmpaĝo de la *Esperanta Civito*. La unua elektita Konsulo de la *Esperanta Civito* estas d-ro Walter Ŝelazny. — K.L.]

Parolas Varsovio en Esperanto

„Kaj nun bonvolu aŭskulti interparolon kun la eksa ministro por la eksterlandaj aferoj, nun estro de la Katedro pri la Eŭropa Civilizacio en la Eŭropa Kolegio en Natolin prof. Bronisław Geremek. La programo kreiĝis kunlabore kun la oficejo de la Komitato por la Eŭropa Integriĝo. Interparolas redaktorino Barbara Pietrzak”.

B.P.: *Sinjoro Profesoro, lastatempe en niaj elsendoj ni multe parolis pri du eventoj, kiuj rekte kaj malrekte fokusigis la atenton ĉirkaŭ via persono kaj elvokis viglajn reagojn de niaj geaŭskultantoj. La unua estis la honorigo de vi per la plej alta pola distingo, la Ordeno de la Blanka Aglo. Tiu evento estis la okazo memorigi vian opozician agadon kaj ankaŭ vian agadon politikan.*

Aktuale vi plenumas neniun publikan funkcion, sed estas afero senduba, ke via persona kontribuo, apud la kontribuo de aliaj personoj, kaŭzis, ke niaj aliĝ-intertraktoj kun la Unio finiĝis per sukceso. Vi plenumas samtempe, sinjoro Profesoro, la rolon de serioza morala aŭtoritatulo en nia lando.

Unue en mia propra nomo kaj tiu de niaj geaŭskultantoj, kiuj jam reagis je via distingo, mi gratulas al vi, kaj samtempe petas pri mallonga opiniesprimo pri tio, kion signifas por

Pollando la integriĝo kun la Eŭropa Unio.

Prof. Geremek: *La ricevita Ordeno de la Blanka Aglo estis por mi eksterordinara distingo, kaj mi komprenis ĝin kiel konstaton de certaj meritoj, kiujn ĉiu civitano volas alporti al sia lando, kiujn deziras por sia lando. Transprenante la distingon mi esprimis la konvinkon, ke pri patriotismo oni ne devas nur paroli, sed oni devas per ĝi gvidi sin. Kaj tio estis ĉiam mia viv-principo, kiam mi science laboris, mi havis la konvinkon, ke tio alportas certajn esencajn valorojn al nia lando.*

La saman senton mi havis, kiam mi aktivis politike. Kaj mi ankaŭ estas konvinkita, ke la reveno de Pollando al la eŭropaj institucioj estas eksterordinara defio, por kiu ĉiu civitano devus transdoni ĉion laŭ siaj kapabloj. Tio tamen ne signifas, ke la afero de la aliĝo al la Atlantika Pakto, al la Eŭropa Unio kaj pli frue al la Eŭropa

Konsilio ne estas aferoj kontraŭdiraj, disput-vekaj. Ili estas kontraŭdiraj; ofte povas ja aperi duboj, ĉu tio vere bone servas al Pollando. Mi opinias tamen afero tre grava, ke pri tio okazu debato, en kiu ne sole estos interŝanĝitaj retorikaj rezonadoj, aŭ — kio estus malpli bona — ofendaj vortoj, kiam unuj kontestas la nacian senton de aliaj, ilian ĝustan servadon al la lando. Gravas, ke tio estu debato, kiu koncernos estontecon. Tio estas ŝajne paradoksa situacio, ke nun en la eldiroj de historiistoj plej ofte aŭdiĝis vortoj pri la estonteco, kaj ne pri la pasinteco.

Sed ankaŭ mi, en mia politika engaĝiĝo, neniam ĉesis esti historiisto. Por mi la partopreno en la publika vivo ĉiam havis historiajn referencojn. Mi ĉiam rezonis per la nuntempa kaj estonta politiko laŭ la kategorioj de tio, kio okazis. Iu el miaj francaj instruistoj kutimis esprimi la aserton, ke historiisto estas denaska futurologo, ĉar nur li disponas pri tiom grandega laboratorio, en kiu eblas subigi al eksperimentado iujn tezojn kaj hipotezojn.

Efektive, kiam leviĝas la problemo de la membriĝo en la Eŭropa Unio mi pensas tiam pri longdaŭraj historiaj procezoj, kiam Pollando frontis la eblon ligi aliancojn, akiri alianciĝintojn, kaj kiam ĝi frontis solecon. Evidentiĝis, ke nur tiam, kiam Pollando kapablis agi kadre de saĝaj forto-aranĝoj kaj plenumi iun rolon, ne nur por si, sed ankaŭ por aliaj, ĝi

certigadis al si suverenan ekziston, dum soleco ĉiam estis por ĝi malavantaĝa.

Tio estas la ĉefa demando, kiun ni nun frontas. Ni ja estas membriĝonta en la Eŭropa Unio kiel malfruiĝinta aliĝanto, ĉar la natura loko por Pollando estas Eŭropo. Komencante de preskaŭ la 962 jaro kaj la 1000 jaro Pollando troviĝis en la familio de la eŭropaj nacioj. Ĝis la lasta milito, kiam ĝi ek troviĝis ĉe la ĝusta flanko. Ni estis venkitaj de kontraŭuloj, sed ĝuste la argumentoj de la tendaro, al kiu Pollando apartenis sekve de la dua mondmilito estis klare difinitaj, kaj venkis.

Tamen Pollando pro la internaciaj decidoj, spite sin mem, ek troviĝis en alia loko. Ĝi ne utiligis la bonaĵojn de Marschall-plano, malgraŭ tio, ke oni proponis tion al ĝi. Nun membriĝane en la Eŭropa Unio Pollando havas la senton, ke ĝi disponas pri historiaj argumentoj. En politiko tio ne multe signifas, sed Pollando ankaŭ alportas ion al la Eŭropa Unio. Kaj fine pri tio mi estas firme konvinkita.

Pollando membriĝante en la Unio akiras la ŝancon akiri siajn aspirojn, naciajn eblojn, akiras la ŝancon plenumi sian rolon.

Tio similas al la situacio de granda elekto, kiun Pollando havis lime de la X kaj XI jarcentoj, kiam ĝi akceptis kristanisman okcidentan, kiun ĝi havis en la XVI jarcento, kiam ĝi elektis certan reĝimon de demokratia monarĥio, maloftan en la tiam

Eŭropo, kaj fariĝis granda potenco liganta diversajn naciojn, diversajn lingvojn, diversajn kulturojn kaj diversajn religiojn. Kaj povas esti ankaŭ nun: la nuna elekto, kiu realiĝas ligo kun la membriĝo kun la Eŭropa Unio, kreos por Pollando similan ŝancon.

B.P.: *Do, la komprenado de la historio signifas komprenadon de la estonteco. Kaj kia estas diferenco inter la historio kaj la tradicio? La historion konsistigas sekvo de la faktoj, la tradicio difinas iujn valorojn. Kiel tio devas harmonii en nia historio?*

Prof. Geremek: Historio efektive estas ĉio ĉi, kio okazis, kio efektiviĝis, kio subiĝas al kritika pripenso. La laboro kritika, la laboro de historiisto havas enorman influon je tio, kion ni scias pri la pasinteco. Sed mi plene samopinias kun vi, ke la tradicio estas sekvo de la alifarita historio, sed historio, en kiu ni faris elekton. Mi opinias ankaŭ, ke estus tre malbone, se ni traktos la historion nur didakte, se ni utiligus nur tion, kio estas bona, en kiu ni vidus nur nian rolon kleran kaj belan.

Afero enorme grava estas preni respondecon ankaŭ pro la malhelaj flankoj de la historio, ankaŭ pensi pri tio ekzemple, ke en la XX jarcento, tiu malgaja jarcento de la du mondmilitoj, du totalismaj sistemoj, ambaŭ mondmilitoj eksplodis sur la eŭropa kontinento, ambaŭ ideologiaj sistemoj – ideologie, politike – naskiĝis sur la eŭropa tero. Do, kiam

ni diras pri tio, ĉar tiel mi pensas, ke la eŭropa integriĝo estas superba sukceso de Eŭropo kaj de la mondo en la XX jarcento, ne eblas forgesi tamen pri tiu alia, obskura flanko de la respondeco.

Do, la historio signifas ankaŭ transpreni respondecon pro tio, kio okazis en la komunumo, al kiu ni apartenas. Tradicio, aliflanke, estas tio, per kio ni volas difini la mondon de valoroj, organizantaj nian agado-estontecon. Ni do diras: efektive la totalisma sistemo, unu kaj la alia, naskiĝis en Eŭropo, sed tio, kion ni volas, estas demokratio kaj libereco, kiuj ankaŭ sur tiu ĉi kontinento naskiĝis. Ni faras elekton, kaj ni volas, ke per tio gvidu sin nia estonta evoluo.

Mi pensas, ke afero kun aparta valoro estas ankaŭ la respektado de la homa digno. Kvankam tio ŝajnas esti sole la retorika figuro, sed en la respektado de la homa vivo sur la grundo de tiel konceptitaj valoroj neimageblaj estas aktoj de terorismo, de la amaspereiga detruo, kaj eĉ memmortigaj atakoj. Samtempe temas pri referenco al iu tradicio, kiu estas tradicio humanisma: religia kaj laika. Nome, tradicio kristana kaj tradicio humanisma, kiun Eŭropo heredis de antikveco. Temas pri la respektado de la homa digno kaj signifo de la homa persono.

Temas fine pri tia tradicio, kiel *Solidareco*. Tiu vorto „solidareco” havas apartan signifon por Poloj en mallongdaŭra tempo historia, sed ankaŭ

en tre longa perspektivo. Se nun ni rigardas Eŭropan Union kiel komunumon, pli komunumon ol la ŝtatan organismon, kiel komunumon de ŝtatoj, nacioj, homoj, civitanoj, tre esenca estas tio, ke la valoro de solidareco estu nia elekto. Ĉar aliflanke ni frontas socian „darwinismon”, ni frontas la konvinkon, en la scienco, filozofiaj ideoj de Eŭropo emfazitan en la diraĵo, ke homo por alia rolas kiel lupu. Ke la milito de ĉiuj kontraŭ ĉiuj estas principo de la homa evoluo, ke la klasbatalo estas la sola elemento, ebliganta kompreni historion, tion ni kontraŭargumentas per la konvinko, ke la kunlaboro de homo kun homo estas iu valoro.

Kaj tia elekto de la tradicio emfaziĝas ankaŭ en la politikaj agadoj. Ĉar kaze de solidareco en la kunteksto de Eŭropa Unio ni memoras, ke ĝi ne nur helpas nin, landojn malpli riĉajn, tiujn 10 landojn, kiuj — krom Cipro kaj Malto — estas landoj multe malpli riĉaj ol la landoj de la Eŭropa Unio. Sed tiuj landoj dank’ al la politiko de solidareco ne havas plenan ŝancon akiri la nivelon, kiun ĝuas nun landoj pli bonstataj.

Mi pensas, do, ke elekto de tradicio ne estas nur afero porokaza. Ja, en naciaj festoj, ŝtataj distingoj, memorigas al kiu tradicio ni referencas. Temas pri pragmata akto, kiun entreprenas civitano, kaj en lia nomo la ŝtataj institucioj kaj organizaĵoj, ĉar temas pri akto, kiu difinas nian lokon en la mondo, kaj taskojn, kiujn

ni frontas.

B.P.: *Alimaniere dirite, nun nia plej grava tasko estas krei la civitanan socion.*

Prof. Geremek: Tio estas enorme grava, rigardante la mondon ni povas diri, ke tio daŭre en pli signifa grado estas revo ol fakto, ol realo. Ĉiam estas tiel, ke tiuj refleksoj, kiujn ni deziras, estu refleksoj de la civitana socio. Do, temas pri konscia elekto de politikaj aŭtoritatoj, kaj sekve respondeca observado de iliaj agadoj. Ni volus ankaŭ, ke tiaj sociaj patologioj, kiel korupto aŭ alkoholismo, estu kontraŭbatalataj. Kaj nur la civitana socio plej bone povas tion efektiviĝi.

Temas ankaŭ pri tia elemento de la civitana socio, kiel la korfavora rilato de unu al alia homo. Eĉ en la stratkontakto, en la subteno de homo malpli forta. Sed tio, kio ŝajnas esti tiom simpla, tiom bezona, ne speguliĝas ankoraŭ en la ĉiutaga vivo.

Mi mem frontis surprizan por mi sperton. En la periodo de nelegala agado — la agado de demokrata opozicio — ni observis, kiel bonege funkciis refleksoj de la civitana socio, kiam nekonataj homoj helpadis unuj la aliajn. Mi mem konscias, ke dekoj, centoj, miloj da nekonataj al mi homoj diversmaniere helpadis min; kaj temis pri la civitana socio.

Kaj poste, en la 1989 jaro okazis la politika ŝanĝo, kaj evidentiĝis, ke tio subite malaperis, ke tiuj civitanaj refleksoj malaperis. Sed mi ne tiras el tio pesimismajn konkludojn; mi opi-

nias tamen, ke tio estas eksterordinara, grava kaj malfacila tasko konstrui la civitanan socion, ĉar sen ĝi demokratio povas esti sole kolekto de proceduroj, aliflanke neniam funkcios kiel la socia realo. Nur la civitana socio igas demokration libereco.

B.P.: *Sinjoro Profesoro, vi tre kortuŝis min dirinte, ke vi ion scias pri Esperanto, ke iam vi havis kontakton kun ĝi. Niaj aŭskultantoj atentigas pri la rolo de la lingvo en la kunteksto de la eŭropa integriĝo, pri la rolo de la lingvo, de la eŭropa komunikado kiel faktoro, kreanta la eŭropan identecon, konservanta la nacian identecon. Ĉu kiu ajn nacia lingvo, kaj mi scias, ke ekzemple vi perfekte regas la francan, povas esti kupla ĉi-sfere? Aŭ — kiel atentigas niaj geaŭskultantoj — Pollando havas apartan rajton kaj devon atentigi pri avantaĝoj, kiuj sekvas el apliko de Esperanto, kiu plene ekzameniĝis en sia pli ol 110-jara historio, kiu estas rekonata de niaj aŭskultantoj kiel la marka signo de Pollando pro la fakto, ke Esperanto naskiĝis ĉi tie, ke la kreinto de Esperanto naskiĝis tie.*

Prof. Geremek: En miaj junulaj jaroj, tuj post la milito, mi estis konvinkita, ke ĝuste Esperanto estos la instrumento de la interkompreniĝado de la homoj, ke post tiu drameca sperto de la milito kaj malamo, tia lingvo kiel Esperanto povas fariĝi lingvo liganta. Mi estis tiam skolto, kaj mi lernis Esperanton, eĉ mi gvidis iun societone de esperantistoj, kaj kun eksterordinara satisfakcio mi observis, kiel

tiam kreskis la signifo de Esperanto en la internacia komunikado. Kaj mi pensas pri unu el la internaciaj organizaĵoj: UNO kaj ĝia institucio UNESCO. Esperanto ŝajnis tiam havi la estontecon kiel instrumento, liganta homojn en maniero plej simpla. Tio estas superba lingvo, facile lernebla, utiliganta la riĉon de aliaj lingvoj, kaj pere de tio liganta homojn.

Sed poste vero evidentiĝis plikruela por Esperanto. Du internacie funkciantaj lingvoj: la franca, angla, kunekzistis kun Esperanto en la unua periodo. Mortiga aliflanke por la influo de Esperanto evidentiĝis la evoluo de la angla lingvo, kiel unusola komunik-instrumento.

Nun estas tiel, ke la franca en la diplomatio ĉesis funkcii, kaj la angla havas universalan karakteron. Mi asertas, ke tio ne estas la plej bona por la angla. Tio ne estas la plej bona por la mondo; por la angla — ĉar tiel diras miaj kolegoj Britoj, okazas malriĉigo de la angla. Aparte brita-angla lingvo, en kiu certa elemento estas ekzemple humur-sento.

Ĉio ĉi malaperas, ĉar la lingvo fariĝas sole la instrumento de rektaj kontaktoj, tre simpligita. Esperanto en sia esenco enhavis jam la principon de simpligo kaj do ĝia funkcio estis elemento prefere de riĉigo kaj ne malriĉigo.

Ĉu okazos tiel, ke Esperanto revenos al sia rolo, kiun la kreinto prirevis, kaj por tio tiu lingvo elstare taŭgas, estas malfacile diri. Ni observas, kiel

influite de la angla saksa mondo la angla lingvo en ĉiuj agadoj internaciaj, ligantaj naciojn, ŝtatojn, instituciojn internaciajn fariĝis sola kaj ekskluziva instrumento de la kontaktoj.

B.P.: *Esperantistoj ne kontestas la internacian signifon, kiun plenumas la angla, aliflanke ili substrekas, ke tio ne estas rimedo demokrata, ke ĝi estas rimedo malriĉiganta ilin kaj ilian nacian identecon. Esperanto, malgraŭ la domina rolo de la angla, kiu, povas esti, ankoraŭ plifirmiĝos, ekzistas, funkcias, kaj daŭre rolas kiel ŝanco. Niaj aŭskultantoj demandas: ĉu ĝuste Pollando ne devus pensi pri tio, ke ĝi havas apartan trezoron, kiun povas oferi al Eŭropo. Oni diras kutime en la kunteksto de Pollando pri religiaj tradicioj, per kiuj ni pliriĉigu la mondon. Sed ni havas ankaŭ tiun rimedon de la inter-*

nacia komunikado, pri kiu ni povas atentigi, kvankam ne laŭ la principo, ke ĝi estu rimedo ekskluziva.

Prof. Geremek: Mi estas pri tio konvinkita, kaj laŭ tio, kion mi povis, ankaŭ kiel la ministro por la eksterlandaj aferoj, mi klopodis subteni Esperanton. Mi tre dezirus, ke ankaŭ nun, flanke de la polaj aŭtoritatoj, ekzistu subteno por Esperanto. Efektive Pollando havas certan ŝancon ludi iun rolon ĉi-sfere. Ĉar amaso da homoj parolantaj kaj komprenantaj Esperanton en la mondo estas grandega kaj superas la limojn de kontinentoj, civilizacioj. Do, temas vere pri lingvo, kiu estas elstara, fleksebla, elasta instrumento de kontaktoj. Mi esperas, ke estos por tio helpo, same flanke de la polaj aŭtoritatoj, kiel ankaŭ flanke de la internaciaj organizoj.



Esperanto-Redakcio de Radio Polonia disaŭdigas ĉiutage sian elsendon kvar fojojn per mallongaj ondoj, satelito kaj interrete. Ekde la 1a de januaro 2003 la premiera elsendo estas aŭdigata je la 16.00 h (laŭ la Universala Tempo) per la mallongaj ondoj 41,26 metroj respektive 7270 kilohercoj kaj per la ondo 41,18 metroj respektive 7285 kHz. La ripeto okazas je la 19.00 UT per la ondo 41,18 metroj respektive 7285 kilohercoj. La elsendo estas ripetata la saman tagon je la 20.00 UT nur satelite. Poste okazas la enretigo de la programo. La laŭvicajn fojojn nur persatelite esperantlingva programo estas ripeta la sekvan tagon je la 09.30 UT. Por aŭskulti en la mezeŭropaj landoj necesas aldoni al la tempo laŭ UT 2 horojn. La satelita ricevo estas ebla per: Eutelsat II F-6-Hot Bird-13 gradoj de la orienta latitudo, frekenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H), subportanto 7,38 MHz. Eblas ĉiutage aŭskulti freŝan programon de Pola Radio en Esperanto ankaŭ rete. Oni povas uzi la hejmpaĝon de WRN: <http://www.wrn.org> por kopii la sondosieron (~ 4,4 MBajtoj) aŭ aŭskulti estinte konektita al la reto. Ĉiu programo ne restas pli ol 24 horojn sur tiu loko. Sur la hejmpaĝoj: http://www.radio.com.pl/polenia/esperanto_eo.asp la Redakcio aŭŝas ĉiutage la tekstojn de informbultenoj. Kelkfoje — pro la aktualigo — ili ne plene identas kun la sonversio de la informbultenoj.

La rimarkojn pri la programoj E-Redakcio de PR atendas rete: esperanto.redakcio@radio.com.pl aŭ: pietrzak@wa.onet.pl; poŝte: Pola Radio, E-Redakcio, Al. Niepodległości 77/85, PL 00-977 Varsovio, pk. 46; tel.: (+48 22) 645-93-37, 645-93-58; fakse (+48 22) 645-59-17

Animzorgado kiel la katolika E-movado en Pollando

(unua parto)

Oni petis min, ke mi faru iun resumon de la katolika Esperanto-movado en la nuna tempo. Sed oni ne povas tion fari sen reveno al la komenco de la movado. Mi sentas specialan plezuron pro la fakto, ke Ludoviko Zamenhof, estinte la Judo, mem komencis la kristanan animzorgadon. Eble tio ŝokas iujn, sed la faktoj estas tiaj. En la Esperanto-movado unuiĝis la Malnova kaj la Nova Testamentoj, la judaismo kaj kristanismo.

En la jaro 1887 Ludoviko Zamenhof eldonis en Varsovio la unuan lernolibron de la internacia lingvo — Esperanto. Ne estas ĝi la unua provo krei tian lingvon. Tiaj tendencoj ekzistis ekde la plej malnovaj tempoj, kiam pli fortaj regantoj strebis surŝuti unu lingvon al tiuj, kiuj estis subigitaj. La samon ni observas hodiaŭ en la Eŭropa Unio rilate al nacioj, kiuj volas eniri en la Union. Nune oni perforte postulas la anglan lingvon.

Tion antaŭvidis L. Zamenhof kaj deziris liberigi la pli malfortajn naciojn de la lingva perforto. Lia ce-

lo estis doni al la homaro la lingvon facilan en lernado, simplan en grammatiko kaj samtempe belan en prononcado, kiu estus libera de la politikaj antaŭjuĝoj kaj povus servi al repaciĝo de homoj, nacioj kaj religioj. Kaj ĝuste tiu ĉi celo estis la kaŭzo al estigo de la Esperanto-movado, kiu ligas la homojn kun simila ideo, kaj la internacia lingvo estas por ili taŭga ilo por realigi la celon. Jam sola lingvo — Esperanto — etimologie signifas la homon, kiu vivas per la espero.

Ludviko Zamenhof (1859–1917) estis la juda okulkuracisto. En siaj leteroj skribis, ke en junaĝo li estis nekredanta. Lia patro ne donis al li bonan modelon, do edukiĝis en la religia indiferentismo. Tamen dum la studoj renkontis piajn gekolegojn, ĉefe la kristanojn, al kiuj li ĵaluzis la sencon de la vivo. Tio lin proksimigis al katolikismo, kvankam li koreneniam forlasis historion kaj kulturon de judaismo.

Li naskiĝis en Bjalistoko, kie loĝis Poloj, Rusoj, Germanoj kaj Judoj. Ofte li estis la atestanto de diversaj

konfliktoj, kiujn kaŭzis nekompreneblaj lingvoj. Tio estis la ĉefa kaŭzo por krei la univalan lingvon.

Kiam li ekkredis, en la Biblio li serĉis apogon por sia ideo. En sia lernolibro de la internacia lingvo, sur la unuan lokon li metis *Preĝon de la Sinjoro* (el la Nova Testamento) kiel la fundamentan tekston de la nova lingvo. Tio tamen kaŭzis al li multajn malagrablajn flankojn de sinagogo. Malgraŭ tio, la aŭtoro neniam rezignis el la preĝo, asertante, ke la homaro havas nenium pli belan tekston ol tiun ĉi. Do la preĝo restis en ĉiuj ses eldonoj, kiuj aperis dum la vivo de Zamenhof.

La aŭtoro de Esperanto donis al ni belegan modelon de la ekumenismo. Tiel iusence li fariĝis la religia heroo ankaŭ por la katolikoj. Tiutempe li estis jam la homo de profunda kredo kun larĝa pens-horizonto. Je la unua Universala Kongreso en Boulogne sur Mer (1905 j.) li verkis preĝon de tri grandaj religioj monoteismaj (*Preĝo sub verda standardo*), en kiu sur la unuan lokon metis la kristanojn. Poste, el la hebrea lingvo tradukis la Malnovan Testamenton, ĉar lia Esperanto-movado devis havi la religian karakteron. Kiam ĉe fino de lia vivo naskiĝadis la ateismaj sekcioj de la movado, li plendis, dirante: Se mi scius, ke iam Esperanto fariĝos la senidea movado, mi neniam verkus ĝin.

La signifon de Esperanto tuj ekmarkis pastro prelato Aleksander

Dąbrowski el Vilno. Li la unua skribis leteron esperantlingve al Zamenhof kaj li komencis publikan animzorgadon inter esperantistoj. En Smoleńsk li celebris la unuan sanktan Meson por internacia esperantistaro (la 26an de decembro 1896 j.), latine sed kun homilio kaj kantoj en Esperanto. En la Diservo partoprenis ankaŭ L. Zamenhof. Pastro Dąbrowski postlasis al ni malgrandan kantareton de la ekleziaj kantoj, kiujn helpis al li traduki mem la aŭtoro de Esperanto.

Je la internacia tereno disvastiĝis la animzorgadon profesoro pri la Biblio en la porpastra seminario en Tours (Francujo) pastro Emile Pelletier. En la jaro 1902 li komencis presi la unuan revuon katolikan en Esperanto kiel aldonaĵo al *L' Aube* kaj de la sekva jaro (1903) jam memstaran monatrevuon „*Espero Katolika*”, kiu aperadas ĝis nun en Romo kaj estas la plej malnova revuo aperanta en la internacia lingvo.

„*Espero Katolika*” ricevis aprobon de la loka episkopo, kaj en la jaro 1906 benis ĝin Papo Pio X, kiu tiam diris, ke *Esperanto, kiel la popola latino, havas antaŭ si grandan estonton.*

Dum la unua Universala Kongreso de Esperanto (1905 j.) katolikoj havis jam sian „Asocion de la katolika espero” (ekde 1993 j.), kiu poste (en la jaro 1910) transprenis la nomon „Internacia Katolika Unio de Esperantistoj” (IKUE). La Unio ekzistas ĝis nun kaj havas sian sidejon

en Romo: *Centra Oficejo de IKUE, via di Porta Fabrica 15; IT-00165 Roma RM, Italio.*

Celoj de IKUE laŭ ties Statuto estas:

— plenumi la ordonon de Jesuo Kristo: *Iru en la tutan mondon, kaj prediku la Evangelion al ĉiu kreitaĵo* (Mar 16,15);

— montri la unuecon de la Eklezio, uzante la internacian lingvon en ĝia liturgio kaj apostola agado;

— kontribui al realigo de la homaj interkompreno, frateco kaj paco en la nuna mondo;

— strebi *por ke ĉiuj estu unu* (Joh 17,21).

Dum la unua Universala Kongreso en Boulogne sur Mer (1905 j.) katolikoj estis speciale aktivaj. En unu el diservoj pastro E. Peltier, respondante je preĝo de Zamenhof, diris: *Korojn de ĉiuj tie ĉi kunvenintaj homoj plenigas la frata amo. Sed ĝis nun oni diradis pri la frateco de la nacioj. Mi tamen volas esprimi la deziron, por ke pere de Esperanto proksimigi ankaŭ la disigitajn religiojn, ke la pastroj: katolikaj, ortodoksaj, protestantaj, moseanaj kaj mahometanaj unuiĝu por la komuna bono. La „Espero Katolika” havas ĝuste tian celon.*

En tiu ĉi Diservo patroprenis oficiale, kiel kutime ankaŭ aliloke, Ludoviko Zamenhof kaj anoj de la aliaj kredkonfesoj. Ekde tiu tempo oni povas diri pri la plena ekumenismo en la Esperanto-movado.

Sur la pola teritorio la katolika Esperanto-movado komenciĝis, kiel estis dirite, kune kun la naskiĝo de Esperanto. Post pastro A. Dąbrowski aperis aliaj pastroj esperantistoj kaj inter ili ankaŭ episkopo Bandurski el Krakovo kaj la diservanto episkopo Konstanty Dominik el Pelplin (1870–1942). Dum la oka Universala Kongreso en Krakovo (1912 j.) liturgio de sankta Meso havis jam multe da internacia lingvo.

Al la plej eminentaj agantoj esperantistaj el la intermilita periodo apartenis beata arkiepiskopo Georgo Matulewicz, kiu en „Gazeta Kościelna” (n-ro 33/1926 pp. 187–189), en artikolo sub titolo *Esperanto en servo al la Eklezio* skribis en longa artikolo: *...Estas ĝenerale konate, ke inter provoj de la internacia lingvo — Esperanto plenumis plej bone sian rolon kaj nune ĝi estas ĉie konata... Plej efike uzadas ĝin komunistoj, socialistoj, senkreduloj, liberpensuloj, masonoj, Judoj kaj sektanoj... Teroristoj uzadas Esperanton efike al siaj celoj kaj la katolikoj plej ofte atendas, kvazaŭ ili timus malpurigi per Esperanto... Tamen estus malprudente ne uzi la lingvon pro tio, ke verkis ĝin Judo. Al ni plej gravas... ke Esperanto povas alporti profiton al la katolikismo...*

Pola Katolika Unio de Esperantistoj (PKUE) naskiĝis en Praĥo dum la 14a Kongreso de IKUE en la jaro 1929. Fondis ĝin du fratoj esperantistoj: pastroj Paŭlo kaj Maksimilia-

no Janik el Katovice. La organizacion aprobis episkopo Adamski el Krakovo kaj pastro Paŭlo estis ornamita pro sia agado *Pro Ecclesia et Pontifice*. La organizacion poste subtenadis kardinalo Aŭgusto Hlond el Krakovo; kaj sankta Maksimiliano Kolbe volontigis siajn alumnojn el Niepokalanów al lernado de la internacia lingvo, skribante el Japanujo: *La „Kavaliro de la Senmakula” (Rycerz Niepokalanej) en Esperanto trovus la legantojn ankaŭ tie ĉi, en Japanujo... Via partopreno en la internacia Esperanto-movado plaĉas al la Senmakula* (1931 kaj 1937 j.)

Al la esperantistaro apartenis ankaŭ pastro beata Tito Brandsma (la Nederlandano), murdita de hitleranoj en Dachau, beatproklamita la 3an IX 1985 j. Lia nomo figuras en jarlibroj de la intermilita tempo.

Post la dua mondmilito revivigis la PKUE-on pastro Henriko Paruzel el Zabrze kiel la katolikan sekcion en la Pola Esperanto Asocio

(PEA). En kadro de la agado prise-rvis la 44an Universalan Kongreson en Varsovio (1959 j.). Kaj la okan de aŭgusto de la sama jaro gvidis la unuan pilgrimon de esperantistoj sur la Helan Monton, al kiu celebris sanktan Meson kaj predikis esperantlingve episkopo Stanislavo Czajka el Ĉenstoĥovo. Estis tiam la 30a datreveno de PKUE-fondiĝo. La sekvan pilgrimon li gvidis en la jaro 1966a okaze de la 1000-jara datreveno de la Bapto de Pollando (14 IV 966 j.).

La 17an de januaro 1977 j. pastro H. Paruzel pereis en la politika atenco de la *nekonataj agantoj*. Estas li la viktimo de la katolika Esperantomovado en Pollando.

Ekde la 1974 jaro esperantistoj ĉiujare pilgrimas al Ĉenstoĥovo por siaj *preĝtagoj* dum la tria sabato kaj dimanĉo de oktobro. Organizadas ĝin la pola animzorgado de esperantistoj.

pastro Jozefo ZIELONKA

• „*Letero de la animzorganto*” — redaktata kaj dissendata de pastro Jozefo ZIELONKA estas mendebla ĉe la pastro kontraŭ libervola sumo, kovranta almenaŭ la kostojn de presado kaj ekspedado.

• „*ADORU*” — la ekumena preĝ- kaj kant-libro, prezo 40,00 PLZ + sendokostoj, mendebla je la sama adreso:

ANIMZORGADO de ESPERANTISTOJ, pastro Jozefo Zielonka, str. Lwowska 102, 33-100 Tarnów, Pollando.

• „*DIA REGNO*” — organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia (protestanta), aperas 6 fojojn jare. Mendebla en la Eldonejo HEJME. Tutjara abono kostas 30,00 PLZ.

Geesperantistoj el Bytom, Zabrze, Tarnowskie Góry, Piekary Śl., Świętochłowice, Katowice kaj la ĉirkaŭaj urboj kaj vilaĝoj renkontiĝas ĉiun unuan mardon de la monato je la 17.00 horo en Urba Kulturdomo (nun Ensemblo de Danco) en Bytom ĉe la strato Żeromskiego 27. Meze kolektiĝas 6–8 personoj, precipe por libere konversacii, sciigi pri novaĵoj kaj kanti Esperantajn kantojn.

Władysław BURSZTA

SUKCESA TAGO DE LA PATRONO

Tracie je la mezo de decembro en XXXI Lodza Liceo je la nomo Ludoviko Zamenhof okazis „Tago de la Patrono” La 13.12.2002 je la 11.00 horo feste ornamita gimnastika salo estis plena da gastoj. Ĉefe alvenis lernantoj el kelkaj lodzaj mezlernejoj. Venis ankaŭ lodzaj kuratoroj el Kleriga Oficejo, instruistoj, membroj de kvartala konsilantaro kaj esperantistoj. Honora gasto estis pola ĵurnalisto–esperantisto Roman Dobrzyński el Varsovio. El la ĉefurbo venis ankaŭ Irmina Szustek — membro de Junulara Klubo de Internacia Lingvo Esperanto „Varsovia Vento”. Tutan feston organizis kaj gvidis Jan Szałowski, instruisto de historio en la lernejo.

Por aŭdigi sonon de esperanto junuloj kantis esperantajn kantojn, deklamis fragmenton de fama pola epopeo „Sinjoro Tadeo” kaj poeziaĵon de Julian Tuwim „Autuna pluvo”. Poste okazis finalo de la lasta parto de la konkurso pri „Scio pri Esperanto kaj Ludoviko Zamenhof”. Tri personaj grupoj el diversaj lernejoj montris siluetojn de famaj esperantistoj. Ĉiuj ricevis premiojn fonditajn de la liceo, kvartala konsilantaro, vojaĝoficejo „Vilejka” kaj PEA.

La sekva punkto de la programo estis prelego de Roman Dobrzyński kaj montrado de lia filmo „Ludovikoj en Brazilo”. La filmo rakontas pri Brazila vilaĝo *Bona Espero*, en kiu funkcias lernejo por infanoj. La brazilan lernejon gvidas esperantistojn kaj dank’ al ili senazilaj infanoj povas trovi en *Bona Espero* hejmon kaj edukadon. Ofte la lernejon vizitas kaj helpas al ĝi esperantistoj el la tuta mondo.

Ĉiuj gastoj de Tago de la Patrono povis vidi, ke la ideo de Ludoviko Zamenhof estas viva, utila kaj helpas al homoj en diversaj lokoj en la mondo. Post la filmo junaj esperantistoj kaj Roman Dobrzyński vizitis du klasojn kaj respondis al la demandoj pri Esperanto kaj E–movado.

Robert KAMIŃSKI

AGO-TAGO EN LODZO

La 14.12.2002 varsoviaj kaj lodzaj esperantistoj organizis ago-tagon. Junuloj el Lodza filio de PEA kaj Junulara Klubo de Internacia Lingvo Esperanto — „Varsovia Vento” ĉe la ĉefa lodza strato Piotrkowska disdonis ĉirkaŭ cent flugfoliojn pri la internacia lingvo. Krom disdonado ili interparolis kun junaj homoj kaj interese rakontis pri Esperanto.

IMITEBLA NOVJARA KUTIMO

Ĉijare la 1an de januaro en lodza Urboficejo ĉiuj volontuloj povis bodeziri aŭ saluti prezidenton de la urbo kaj urbestaron. Oni povis fari tion mem buŝe aŭ skribe. Inter 12.00 kaj 14.00 horoj en la ĉefa salono de urbestaro estis metita speciala memorlibro por gastoj. Ĉijare prezidanto de Lodza filio de Pola Esperanto-Asocio Robert Kamiński enskribis esperante novjarajn bondezirojn al prezidento de la urbo. Li apelacias al ĉiuj esperantistoj: imitu tiun kutimon. En ĉiuj urbdomoj egzistas memorlibroj, kaj eblas trovi okazon enskribi salutojn en Esperanto. Ankaŭ tiamaniere ni povas rememorigi ekziston de esperantistoj en iu urbo.

KOSZALIN

Impresplena estis la lasta Zamenhof-vespero en Koszalin, okazinta la 20an de decembro 2002 jaro. Malgraŭ frosta vetero la solenaĵon partoprenis preskaŭ 30 esperantistoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ delega-

cio de Esperanto-Klubo el Neubrandenburg (DE), veninta je la invito de koŝalina filio de PEA. La programo de Zamenhof-vespero estis tre riĉa kaj interesa por ĉiuj.

Je la 17.30 koŝalinaj kaj germanaj gesamideanoj ariĝis ĉe la memorŝtono omaĝe al D-ro Ludoviko Zamenhof por tie flamigi kandelojn, meti florojn kaj aŭskulti kelkajn varmajn frazojn de D-ro Marian Łaba pri la historio de la monumento, starigita en la centra parto de la urbo antaŭ 33 jaroj, okaze de la 10a datreveno de E-movado en Koszalin.

Je la 18.00 komenciĝis solenaĵo en la proksime situanta klubejo de Koŝalina Loĝkooperativo „Nia Domo”. Tie, en bele dekoraciita ĉambrego, ĉiujn kunvenintojn tre varme bonvenigis Czesław Baranowski, prezidanto de E-filio en Koszalin. Prezente la programon de la solenaĵo li substrekis, ke tradiciaj Zamenhof-Tagoj estas organizataj en la tuta mondo por proksimigi al esperantistoj vivon kaj poresperantan agadon de pola geniulo Ludoviko Zamenhof.

Turnante sin al germana delegacio li esprimis sian grandan ĝojon pro la amika kunlaborado inter esperantistoj de du ĝemelaj urboj, daŭranta jam 34 jarojn. Kiel veterano de koŝalina kaj pola E-movado li fiere konstatis, ke la tempo laboras por Esperanto, ke plena venko de la lingvo internacia venos pli frue ol ni estas pensantaj kaj tiam laŭ la vortoj

de nia majstro: „**Sur neŭtrala lingva fundamento, komprenante unu la alian, ni ĉiuj faros en konsento unu grandan, mondan familion**”.

Poste ĉiuj kunvenintoj aŭskultis interesan prelegon de Werner Pfenning, prezidanto de la Landa Asocio de GEA en Meklenburgo-Pomerio. Prelegante pri Ludoviko Zamenhof, Werner montris diversajn flankojn de lia nobla vivo kaj prezentis rolon kaj ŝancojn de Esperanto en Eŭropa Unio. Esperantistoj demandis lin i. a. pri la problemoj, kiuj povas aperi en Pollando post la membriĝo al Eŭropa Unio.

Tre plaĉis al ĉiuj la distra parto de la solenaĵo, preparita de koŝalina kantensemblo „ESPERO” kaj amikaj interparoloj ĉe kafo, kukoj kaj glaseto da vino. Kune estis tostita la prospero de Esperanto-movado en la Nova Jaro 2003.

Sabate la germanaj gastoj kune kun prezidanto kaj vicprezidanto de E-filio en Koszalin vizitis la urbojn: Słupsk, Ustka kaj Darłowo. Dimanĉe, antaŭ forveturo hejmen, ili vizitis la plej modernan komercan kaj distran centron en Koszalin.

Czesław BARANOWSKI

ESPERANTOTUR KAJ FLUGO

Esperantotur funkciis kiel Turisma Servo de MONDA TURISMO dum 30 jaroj (1973–2002) kaj nun pro ekonomiaj kialoj transformiĝis en *Internacian Klubon ESPERANTOTUR*. De kelkaj jaroj *ESPERAN-*

TOTUR kunlaboras kun „FLUGO”, kiu okupiĝas ĉefe pri aviadila turismo, sed ankaŭ pri E-turismo kaj havas Esperanto-nomon (FLUGO en la pola lingvo LOT — tiel nomiĝas pola flugkompanio). Nun *ESPERANTOTUR* realigas pere de „FLUGO” ĉiujn grupojn, tial eblas dediĉi pli da zorgoj pri esperantlingva programo de la sendataj grupoj. Por la 2003 jaro estis planitaj pli ol 100 vojaĝoj, el kiuj pli ol 30 internaciaj.

Al la plej gravaj vojaĝoj apartenas: februafe — vojaĝo kun prof. R. Mielcarek al Suda Ameriko (Peruo-Bolivio-Ĉilio ĝis Fajrolando-Argentino-Urugvajo-Paragvajo-Brazilo), marte — al Centra Ameriko, aprile — ĉirkaŭ la mondo, majo — 19 Internacia Simpozio pri Esperanto-Turismo kun 10 vojaĝvariantoj al Ĉinio, junio — 13 Eŭropa Esperanto-Forumo en Benelukso kaj Parizo, julio — vojaĝoj Eŭropo-Afriko kun partopreno en la 13 Internacia E-Kongreso kaj 62 Hispana E-Kongreso en Valencio, sep vojaĝoj al la 88 UK en Goteborgo kaj 59 IJK de TEJO en Lesjofors kaj aŭguste — Ĉebaltmara Folkloro Festivalo en Riga-Jurmala (Latvio).

Se interesas Vin tiuj E-vojaĝoj kontaktu: Internacian Klubon

ESPERANTOTUR

str. M. Skłodowskiej-Curie 10
85-094 Bydgoszcz, Pollando
tel/fax: (48-52) 3461151
e-poŝto: andreo@rubikon.net.pl

La 25a ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO MIELNO (PL) 2003.06.17–2003.06.25

LA PROGRAMO de la 25a ĈEP antaŭvidas: interesajn prelegojn kun videofilmoj, konkursojn kun multaj premioj, 2 busajn ekskursojn al vizitindaj urboj, ĉiutagan kantadon, dancon kaj lingvoperefektigadon. Antaŭtagmeze estos sufiĉe da tempo por agrable promeni kaj sunumi, ankaŭ sur la proksima naturista strando. Eblas naĝi ne nur en la maro, sed ankaŭ en dentementitaj naĝejoj kun varmigata marakvo.

Esperantistoj el diversaj landoj havos okazon prezenti propran programon. Ni petas kunporti al MIELNO diversajn esperantaĵojn, sonkasedojn kun belaj kanzonoj, E–videofilmojn, ktp. Estas planata eta aŭkcio de esperantaĵoj.

LOĜLOKO: GASTAMA RIPOZCENTRO de POLAJ SPORTTEAMOJ.

ADRESO: 76-032 MIELNO, str. Mickiewicza 3. tel. 094 / 3189-539.

La ripozcentro, nuntempe modernigata, konsistanta el 5 duetaĝaj domoj kun sunterasoj, estas ĉirkaŭbarita kaj garantias al aŭtoposedantoj sekuran aŭtoparkon. Ĝi situas ĉ. 150 m de JAMNO–lago kaj ĉ. 70 m de la strando.

LOĜKONDIĈOJ: Loĝado nur en dultitaj, bone ekipitaj ĉambroj kun propraj lavujoj. En ĉiu koridoro estas 4 ĉambroj kaj 2 duŝejoj, eblas saŭni, bilardi, kafumi ktp.

SURLOKE TROVIĜAS: belega manĝejo, kuzovenejo, diskejo, eta bufedo kaj florornamita korto kun multaj sidlokoj, por ripozi, babilo kaj kanti.

Dum la aranĝo la tuta ripozcentro estos okupata nur de esperantistoj.

PARTOPRENKOTIZO: inkluzivas oportunan loĝadon, bongustajn manĝojn (tri manĝoj tage), kongresajn materialojn, kaj riĉan esperantan programon, sed nenian sanasekuron.

Eksterlandanoj pagas partoprenkotizon surloke, en MIELNO, sen pli frua antaŭpago.

PARTOPRENKOTIZO VARIAS DEPENDE de ALIĜTEMPO kaj egalas al:

A	B
40 €	220 € — aliĝo gis la 30.03.2003
150 €	230 € — aliĝo gis la 30.04.2003
160 €	240 € — aliĝo gis la 30.05.2003

TARIFO: **A** — por mezeŭropanoj, **B** — por esperantistoj el ceteraj landoj.

ATENTON: Post la 30a de majo 2003 jaro ni povas akcepti aliĝilojn, se restos ankoraŭ liberaj ĉambroj.

ALIĜMANIERO: Oni devas plenigi la kunmetitan aliĝilon kaj resendi ĝin kiel eble plej frue al ĈEP–ORGANIZANTOJ.

ALVENO: Oni povas veni al Mielno jam la 16an de junio, posttagmeze. MIELNO estas facile atingebla per diversaj trafikiloj. De KOSZALIN al MIELNO cirkulas urba buso Nro 1 (BUSHALTEJO troviĝas apud Koŝalina stacidomo). En MIELNO oni devas elaŭtobusiĝi ĉe la tria bushaltejo kaj post dekkelkaj paŝoj iri maldokstre, laŭ nia direktomontrilo kun VERDA STELO.

Karaj Gesamideanoj, ne perdu la okazon, veni al MIELNO kaj partopreni nian JUBILEAN ĈEBALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON.

La aranĝo impresos vin forte pro neripetebla esperantista etoso kaj riĉa E–programo. Ĝi donos al vi ankaŭ bonegan okazon por profundiĝi vian lingvokononon, ligi novajn amikajn kontaktojn kaj tre agrable pasigi la tempon ĉe la pola marbordo


KORESPONDA ADRESO: POLA ESPERANTO–ASOCIO, BOX 30, 75-016 Koszalin-1 Pollando, TELEFONO: 094/3404-563 (petu S–ron BARANOWSKI). Poŝtelefono al ĈEP–organizanto: +48/503-417-825.

RETADRESOJ: barslavo@poczta.onet.pl aŭ barslavo@wp.pl

Pro via helpo en popularigado de nia aranĝo mi anticipi kore dankas vin.

Etendante la manojn de fore mi brakumas vin kaj salutas tre kore.

Ĉeslavo BARANOWSKI



„La verko de s-ino Zofia Banet-Fornalowa prezentas efektive la dokumentaran, fontan karakteron pri la vivo kaj prosperanta agado de Antoni Grabowski; ĝi pli proksimigas al la leganto la unikan personecon de tiu ĉi eminentulo, la plej proksima al Ludoviko Zamenhof kunlaboranto kaj amiko, prezentante la silueton de Antoni Grabowski — eminenta Esperanto-aganto, kun estimo kaj simpatio — kion li plene meritas.

La verko estas ne nur leginda, sed ege valora por ĉiuj esperantistoj kaj la aliaj, kiuj interesiĝas pri Esperanto; la verko estas nepre havebla por ĉiuj bibliotekoj, kiel vera rarajo en la skalo internacia, pliriĉiganta esperantan literaturon. Ĝi estas mendebla ĉe la aŭtorino: str. Bliska 12, 05-090 Raszyn, Pollando.

Antoni Grabowski — eminenta Esperanto-aganto. Dua eldono. Eldonejo HEJME, Cze-ladź, Pollando, 2002 j., 158 pĝ. kun multaj foto-ilustraĵoj. ISBN 83-907637-2-9. La prezo por poloj egalas al 30,00 PLZ kaj por eksterlandanoj 15,00 EUR; libroservoj kontaktu la aŭtorinon por interkonsenti ĉi-rilate.



Kiu el ni ne bezonas vortarojn? Kaj se vi volas havi iun bonan, ampleksan, utilan ilon, elektu la ĵus reeldonitan OSPE — *Obszerny Słownik Polsko-Esperancki*, kreitan en Opole kaj eldonitan en Koszalin. Mi ne trovis la indikon pri la nombro de vortoj, sed tuj ĝi fariĝis por mi mia „dekstra mano”.

La vortaro estas mendebla ĉe la Aŭtoro: s-ro Kazimierz Strzelecki, ul. Katowicka 13/7 45-061 Opole, aŭ ĉe s-ro Czesław Baranowski, ul. Artylerzystów 18 B, 75-646 Koszalin.

Kazimierz Strzelcki, Maria Bonczol, *Obszerny Słownik Polsko-Esperancki*, dua eldono, Opole 2002, A-5, pĝ. 517, ISBN 83-916881-0-0, prezo 30 PLZ + sendokostoj.

